eklernu Esperanton"; li apogis la ideon en sia rondo, apogis poste niajn strebojn, organizi la enlandan movadon. Pluraj ĵurnalistoj intervjuis la japanan profesoron helpe de rumanaj Esperantistoj, kaj spite al la stalinisma tiutempa malpermeso de la ideo en la lando, Esperanto fariĝis interesa diskuttemo en altprestiĝaj rondoj. Per similaj eventoj aŭ per simplaj hazardaj renkontiĝoj kun seriozaj Esperantistoj fariĝis apogantoj de la ideo la adademianoj *Bogza, Arghezi* (la plej granda rumana poeto de la 20-a jarcento), *Ana Aslan* (mondfama gerontologo), kelkaj ĵurnalistoj, politikistoj kaj instruistoj en diversgradaj lernejoj. Pensante al tiaj fenomenoj, mi tre seniluziite legis antaŭ jaroj, ke gvidantoj de TEJO vizitis Portugalion – kaj ilia raporto temis pri la fakto, ke tie "oni trinkis barelon da biero!" Ĉu tio estas poresperanta agado? Ni ne miru, ke tiaj "apostoloj" kulpigas la "objektivajn kondiĉojn" pro la malrapida evoluo aŭ portempa stagnado de nia movado.

Iam prof. *Amri Wandel* vizitis *Bucureşti* por unu aŭ du tagoj. Mi bedaŭris, ke lia vizito ne estis antaŭe programita, ĉar li grandefike povintus paroladi esperantlingve en la Universitato pri faka problemo kaj pri "La lingva komunikado en la mondo". Li renkontiĝis nur kun esperantistoj, do ni perdis raran kaj gravan momenton en niaj streboj. Bedaŭrinde, ege bedaŭrinde, ni ofte legas pri vizitoj de niaj personecoj en diversajn landojn, **sed ili kontaktas kutime nur Esperanto-redakciojn, Esperanto-rondojn, partoprenas nur Esperanto-aranĝojn**. Kial? Ĉu iu povas kredi, ke la plej altprestiĝa personeco de la Esperanto-sciencistaro nuntempa, prof. *Selten*, Nobel-premiito, ne estintus ĝojege kaj respektoplene akceptita en ĉiu ajn sciencista, universitata, akademia, kultura, junulara institucio de kelkaj landoj por prelegi esperantlingve almenaŭ 30 minutojn pri teorio de la "strategiaj ludoj", pri kiu li eminente paroladis germanlingve en Berlino kaj esperantlingve en Prago dum la Universla Kongreso de Esperanto 1996? Li antaŭnelonge partoprenis en Ĉinio fakan kongreson kaj donis interesan intervjuon en "El Popola Ĉinio". Ĉu niaj aktivaj ĉinaj samideanoj ne povintus pli fruktodone kapti la eksterordinaran okazon? **Miaopinie temas ne pri loka manko, sed pri strategia principo, neglektata en nia movado.**

Ignat F. Bociort
Wustrowerstr. 1
DE – 13051 – Berlin
GERMANIO

Registro

Scienca elĵo kaj aliaj kontribuoj en la lastaj 12 kajeroj de Scienca Revuo:

SR n-ro 181 (SR 2/2000) – SR n-ro 192 (SR 1/2003)

I. Scienca elĵo en:

n-ro 181 Vol. 51 (2000)(2) p. 42-50 SR 2/2000

Verda teo kontraŭ kancero
Anoncas sin "farmakofarmistoj"
Malheleco akcela
La plej malgranda harpo de la mondo
Sono-sensoro por toksaj gasoj
Kalkulo kun katastrofo
Malaperas marbordaj strandoj
Oni timas plialtiĝon de perforteco
Lamoj gardas britajn ŝafojn
Globalizado
Pliiĝas la kvoto de HIV-infektitaj virinoj
Hundoj subtenas fizikan viglecon
Floragoĉi
Lumo ĝustigas la internan horloĝon
Parašuto por aviadiloj
Televidado klerigas
Soldatoj gardadas palinurojn
Dioksina skandalo
Sonĝo kaj profunddormado
Tricent mil ratkaptistoj
Aŭtora manuskripto
La plej malĝusta lingvo en germana laborejo

n-ro 182 Vol. 51 (2000)(3) p. 44-48 SR 3/2000

Birdo de la jaro: venkis la tufgrebo
La germana esplorado tro fermita por reformoj
25 landoj senarbaraj
La arbaroj de Bohemio plej grave damaĝitaj
En Berlino strikte malpermesita
Homoj provokas ŝarkdanĝeron
Plua planedosistemo
Amazona fonto difinita